

& Danco de skeletoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 319 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Eŭgeno Miĥalski (la 25an de novembro 1917. El: "Kantoj de l' Amo kaj Sapiro" (poemoj de la naiva juno)", Eldonejo N. Ŝapiro, Varsovio, 1934). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo Toreshavenaj de Jalgrima balado.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/so soosodo reerere soososo miisoso laasoso sooso;so miisoso laasoso soososo soososo milre mifa soso;

(#Rekantaĵe: sola so somi re do; re rere so somi so; soso somi re do o)

)×11)+

(& Strofoj:

'1 Skeletoj, skeletoj ĉirkaŭe. Mi volas forkuri, ne povas. ; Skeletoj dentklakas, grimacas kaj en la danca2do sin movas.

(×: **Tondru danco tre ĉarme ; tretu fiere en ĉen' ; staras jen mastrino.**)

'2 Jen ili jam estas proksime kaj manojn ostecajn eltiras ; Kaj volas min kapti en brakojn, – mortecan malvarmon elspiras.

'3 Skeletoj alpaŝas senĉese – Skeletoj ridetas rikane. ; Mi falas silente genuen, mi provas forkuri, sed vane!

'4 Mi rampas, sed estas malfrue. Min kaptas kaj premas teruro, ; Skeletoj dancante alpaŝas, aŭdiĝas obtuza murmuro.

'5 "Ha, jen Vi! Vi volas Vin savi de nia kares', ĉirkaŭprenu?! ; Sed ni Vin ekamis – deziras – kaj Ni ja al ni apartenos.

'6 Ni montros al Vi novan mondon – ni donos al Vi la Potencon, ; Esencon de l'Scio senfina – nur lasu la vivon sensencan;

'7 Nin sekvu en mondon posttomban – en mondon de solaj spiritoj. ; Decidu, Vi hom'! – Ni atendas. Kaj sekvu nin tuj senhezite.

'8 "Ne, ne! Mi ne volas, foriru! Deziras mi vivi ankoraŭ. ; Mi amas la vivon kun ĝia sufero kaj akra doloro.

'9 Se estos mi eĉ malfeliĉa – se premos min la efektivo. ; Mi restos ĉi tie sur tero ; – ne lasos mi kampon de l'Vivo.

'10 Eĉ malgraŭ kruelaj ekbatoj de la Realeco sensenta, ; Eĉ malgraŭ solec' de l'animo kaj malgraŭ de l'mensa turmento."

'11 Skeletoj ekhaltis momente en sia senĉesa almovo. ; Sed tuje jam grincas, rikanas kaj dancas, dancadas denove.)